BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO
8-6-1974

# Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA – DISTRITO FEDERAL
Sede: Edifício Jockey Clube, sala 103
Setor Comercial Sul

CGC Nº
00406 504/1000-06

REDAÇÃO E PRESIDÊNCIA
Rua Galeão Carvalhal, 31 – AP. 73
Telefone 4-8033
11.100 – Santos (SP)

SECRETARIA
Caixa Postal 07 – 1182
Telefone 226-1298
70.000 – Brasília (DF)

(Correspondência para a redação: endereço acima)

JULHO/AGOSTO DE 1981 — ÓRGÃO OFICIAL DO BKE — BOLETIM Nº 63

REDAÇÃO: - MARIA ALMADA

## REALIĜIS LA 66-A UK EN BRAZILO

La brazila ĉefurbo, sen ia ajn troigo, subite fariĝis mondcentro. Komence de la monato julio de 1981-a jaro tra la tuta mondo la esperantistoj sin preparis por la longa vojaĝo al la ĉijara kongreslando.

Ĉirkaŭ 1800 personoj, el pli ol 50 landoj amasiĝis en la sunbrila moderna ĉefurbo de Brazilo, por partopreni la 66-an UK'on, la unuan en la suda hemisfero. La renkontiĝo estas historia.

La granda "Centro das Convenções" neniam ricevis tiom da vizitantoj, precipe multnaciaj kiel ĉifoje. La ĉefa trajto de la kongreso estis, ke malgraŭ la miltlingva ĉeestantaro, ĉiuj amike kaj harmonie interkonpreniĝis pere de la internacia lingvo Esperanto.

En la "Esperantujo" malaperis aĝo, nacio, koloro, politiko kaj ekonomia diferencoj, ekzistis nur esperantistoj, kiuj volonte amikiĝis kaj kune ĝuis la neordinare agrablan etoson.

La solena malfermo okazis en la Parlamentejo Nacia. La altan Protektanton, la Prezidenton de la Federacia Respunliko de Brazilo, Lian Ekscelencan Moŝton João Baptista de Oliveira Figueiredo, reprezentis D-ro Aureliano Chaves, vic-prezidento de Brazilo. Senatano José Lins de Albuquerque reprezentis la kolonelon Jarbas Passarinho, prezidanto de la Senato, ĉeestis la prezidanto de la Deputitara Ĉambro, s-ro Freitas Nobre, kaj aliaj altrangaj politikistoj kaj la reprezentantoj de ĉiuj ambasadoj. En sia parolado, la vic-prezidento diris, interalie: "Fala-se o espanhol em 22 países do mundo, e o português em mais de 6 países. Mas todas essas línguas trazem consigo um aspecto de imposição, seja de ordem cultural, seja de ordem econômica, seja de ordem militar. Nenhuma língua, porém, nenhum idioma carrega consigo o aspecto de neutralidade e de ser desarmada, por excelência, como o Esperanto. (Palmas). Ela não é intrusa, ela não é estrangeira, como disse com muita propriedade, o Senador José Lins, ela não invade as nossas individualidades, não arromba as portas das nossas comunidades por força da prevalência, mas ela penetra nas nossas comunidades porque desejamos que assim o seja, porque abrimos as portas para que isso aconteça. - (Palmas prolongadas).

É preciso, portanto, que se renda sempre uma homenagem a Lázaro Luiz Zamenhof - e nesse particular agiu bem a UNESCO, quando homenageou o centenário de seu nascimento - pelo que trouxe à área específica da linguística. Mas o seu trabalho vai além, penetra profundamente na necessidade crescente que tem o homem de hoje, mais que o homem de ontem, e o homem de amanhã, mais que o

homem de hoje, do bem-conviver. E a condição para o bem-conviver reside no bem entender, vale dizer, falar a mesma língua da inteligência e do coração. (Palmas).

Espero que o Esperanto seja não apenas uma língua universal da inteligência, mas a língua universal do sentimento. (Palmas prolongadas).

Post la parolado la Vic-prezidanto de la Respubliko retiriĝis kaj sekvis la salutvortoj de la diversaj reprezentantoj.

La ĉijara kongrestemo estis "Kulturoj kaj Lingvoj - Pontoj kaj Baroj" - La Kongreso pritraktis tiun kompleksan temon el tri punktoj: Sociologia, Nacikultura kaj Ĝenerala. La temo estis traktita kaj pridiskutita dum la ĝeneralaj kunsidoj. Okazis prelego pri Lingvo kaj interkultura komunikado; la Rolo de la lingvo Esperanto en la nuna internacia ordo; Evolulandoj serĉas sian kulturan identecon; Geologia historio de Brazilo; Eŭropa kulturo en Azia Lingvo; la kontakto la interfluo de homaj lingvoj; kelkaj ecoj de la natura akvo; kaj aliaj interesaj prelegoj. Estis anakŭ rapida kurso pri la nacia lingvo - la portugala - kiun partoprenis multaj esperantistoj, gvidita de Prof-ro José Passini. Prelegis pri la Geografia Historio de Brazilo Prof-ro M. J. Mabezoone.

Ĉiutage estis organizitaj konversaciaj rondoj por la nespertaj parolantoj, kiuj estis tre bone vizititaj; la intereso estis nekutima.

Oni lanĉis kongresan poŝtmarkon kaj stampon dum la solena malfermo de la UK, pri kies akiro estis granda la nombro de la interesatoj.

La progresigan kurson gvidis Prof-ro William Auld, prezidanto de la Akademio de Esperanto kaj redaktoro de la revuo "Fonto".

Klarigon pri la Akademio mem, li donis al la interesatoj. Krom tiuj taskoj prof-ro Auld, faris brilan prelegon, pri la temo "Arto paroli publike", dum la virina publika kunsido.

**DEMANDU AL LA ESTRARO**

Sub tiu ĉi titolo, dum la ĝeneralaj kunvenoj, ĉiuj povis starigi demondojn al la UEA - estraro, kiu volonte donis informojn kaj karigojn al la kongresanoj; tiel eblis dialogi kun la gvidantoj de nia movado.

**OMAĜO**

Ĉijare la nomoj de la salonoj estis: "Ismael Gomes Braga; "Porto Carreiro Neto", "Nid Dutra de Amorim", "Francisko Valdomiro Lorenz", "Laszlo Zinner", "Jorge Hess", el Argentino, "L. L. Zamenhof", "Klara Zilbernik" kaj aliaj internaciaj jam forpasintaj esperantistoj. Estas tradicie doni al la salonoj de la Universalaj kongresoj nomojn de eminentaj, forpasintaj esperantistoj.

**INTERNACIA LIGO DE ESPERANTO-INSTRUISTOJ**

ILEI kunsidis dum la UK, kiel kutime. La kunvenon gvidis la geinstruistoj Elvira Fontes kaj Paulo Amorim Cardoso. Partoprenis ĝin 33 personoj. Temis pri la enkonduko kaj instruado de la internacia lingvo en la lernejojn kaj universitatojn.

**INTERNACIA VIRINA AGADO**

La kunvenon de la virina-agado direktis sam-inoj Eliza Kehlet, Loes Demmendaal kaj Maria Almada. La temo de la kunsido estis: "Pozicio de la virino en la moderna familio", tiu temo estis debatita kun intereso. Pri la temo: "Arto paroli publike", prelegis la akademiano mag-William Auld el Britujo, je peto de la virinoj. Ĉe la fino de la unua publika kunsido, fraŭlino Alcione D. Fernandes, el Porto Alegre, donis klarigon pri la fama ĉimarona rondo kaj ludis gitaron al la ĉeestintoj.

Dum la dua publika kunveno, omaĝe al la virinoj, s-ro Sirio Silva deklamis la poezion "La vojo", de L.L. Zamenhof, kun granda sukceso.

**BEJO**

La debatita temo de la junularo dum la UK estis: "Kiel sin protektu de la kultura konsumado?" - Okazis la 27-an de julio. Estis organizita al la junularo ekskurso, balo kaj komuna biciklado.

Estis rimarkinda la granda nombro de la gejunuloj, kiuj volonte helpis al la LKK sur ĉiuj kampoj. Ili amase partoprenis la perfektigan kurson, la konversaciajn rondojn kaj volonte kontaktiĝis kaj paroladis kun la eksterlandanoj. Ĉiuj klopodis pliboniĝi sian lingvo-scion.

El ĉiuj partoj de la lando aperis gejunuloj, kiuj ĵus lernas aŭ ĵus finis la Esperantan kurson. Notinda grupo aperis el Natal (RN), el kiuj pluraj jam bone parolas la lingvon. Ili entuziasme kaj kun intereso kongresis.

## SKOLTOJ

Ne mankis ĉe la UK grupo da skoltoj el Brazilio mem. La knaboj kun siaj uniformoj estis ĉarmaj. Ili helpis ĉie: donis informojn, laboris ĉe la liftoj kaj deĵoris. La skoltojn instruas s-ino Leda da Silva Gama kaj ili apartenas al la skolta societo "Salgado Filho", en Brazilio.

## ALIAJ PROGRAMEROJ

Kiel jam okazis ĉe la UK-oj, la japanoj prezentis sian "Ĉanojon" (Etiketa formo de preparado kaj trinkado de teo). Kiu havvis japanan paciencon sukcesis gustumi ĝin. Ĝi estis "senpaga" kostis nur Cr.100.oo. Al mi mankis bonŝanco, mi eĉ eniri ne povis la salonon, oni forpelis min trifoje.

krom tiu programero, okazis ŝakfestivalo, prezentado de Oomoto, kunveno de la Baha-a Esperanto-Ligo, filmprogramo, ktp

La unuan fojon okazis ĉe la UK ekspozicio pri pentroarto, kiun organizis s-ino Maria Almada, vicprezidantino de la Universla Artista Ligo de Esperantistoj, kun sukceso. La ekspozicion vizitis plurcentoj da personoj, inkluzive rusoj, kiuj la unuan fojon vizitis UK-on.

La katolikan diservon celebris 5 pastroj el tri landoj en la bela katedralo, kiu pleniĝis kun pli ol mil personoj. La fratinoj Solis el Argentino kantis dum la meso.

La oficiala bankedo estis riĉega kaj bongusta. La balo post la bankedo estis gaja, amuza.

En la nacia teatro okazis koncerto, nacia kaj internacia artaj programoj. Dum la internacia arta vespero sin prezentis la fratinoj Elza Inéz kaj Marta Susana Solis, el Argentino, kies talenton ni jam konis de la I-a Latinamerika Kongreso en Marilia (SP), kiun ili ĉeestis.

La plej laŭdita estis la nacia arta vespero. Pianludis André Luiz de Souza; prezentiĝis, kantis kaj dancis la "Pastoralon", grupo da knabinoj el Maceió (AL); dancis kaj kantis grupo el São Miguel Paulista (SP), en Esperanto kaj finis la programon la grupo da gaŭĉoj, el Porto Alegre (RS).

La grupon preparis kaj gvidis la geedzoj Izaura kaj Ivo Sanguinetti. La pitoreskaj kostumoj, la temperamentaj dancoj kaj la ĉarmo de la gaúĉoj varmigis la korojn en la belega salono "Vila Lobos", de la nacia teatro. La grupo konkeris la ĉeestantojn, kiuj kun bedaúro lasis ilin foriri la palkon. La sukceso estis plena.

Okazis ĉiutagaj rondvojaĝoj tra la urbo kaj tuttagaj ekskursoj al Cristalina kaj Itikira, tra la naturo de Brazilo.

En la libroservo oni vendis bonegajn kaj ĉe ni nekonatajn librojn. Multaj el tiuj libroj estas akireblaj ĉe la Esperanto-Asocio de San-Paŭlo, Rua Faustolo, nº 124 – Agua Branca – CEP 5.041 – São Paulo (SP). Interesatoj sin direktu al Elvira Fontes, prezidantino de la Asocio. Kiu akiras librojn helpas la movadon, por iu pli bona disvastigo de Esperanto. La plej bona kaj utila donaco por la jarfino estas la libro. Aĉetu internaciajn librojn ĉe la APE en São Paulo.

## ESPERANTO-KURSO

Okazis intensiva kurso de Esperanto en la organizaĵo nacia - SENAC (DF), antaŭvidante la UK'on de Brazilo, kaj la 30-an de Julio estis disdonitaj la atestoj al kursintoj.

La gazetaran servon direktis nia ĉefdelegito Giuseppe Grattapaglia, kiu ĉiumatene eldonis bultenon (Kurieron) pri la UK kaj vekigis la esperantistaron pere de rádio, kiu siavice frumatene dissendis informojn pri la UK.

La estraro de UEA post la UK vizitis

la bienon "Bona Espero", direktata de la geedzoj Grattapaglia. Tiu vizito estis dum tri tagoj.

**BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO**

Siaflanke, eluzis la ĉeeston de multaj kongresanoj kaj inaŭguris sian sidejon oficiale. Estis surmurigita memorŝildo el bronzo, kun la nomoj de la personoj, kiuj helpis la aĉetadon de la sidejo.

S-ano Carlos Cunha malkovris la ŝildon kaj la prezidanto F. S. Almada disdonis la arĝentajn plaketojn al la helpintoj, kiuj donacis Cr$ 10.000,00 aŭ pli en unu sola pago. S-ino Nair Cunha organizis koktelon por la solenaĵo.

La sidejo estas kultura centro de Esperanto en la Federacia Distrikto. Post la UK la intereso pri la internacia lingvo kreskis multe en la brazila ĉefurbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo.

**FEDERAÇÃO ESPÍRITA BRASILEIRA**

Estas notinda la intereso kaj ampleksa kunlaborado de FEB Spiritisma Federacio de Brazilo por Esperanto-movado. La "Reformador", ĝia organo, aperigis grandan artikolon pri la UK. Estis disdonitaj pluraj bonaj eldonaĵoj de tiu organizaĵo, senpage, al la kongresanoj. La Esperanto-movado en Brazilo multe ŝuldas al FEB kaj ĝiaj adeptoj por la disvastigo de Esperanto en nia Lando.

**PROMOCIO EN JUIZ DE FORA (MG)**

Mag. José Passini, el Juiz de Fora (MG) estis nomumita vic-rektoro de la Federacia Universitato de Juiz de Fora, kie li instruas Esperanton. Ni deziras plenan sukceson al nia elstara vicprezidanto, unu el la geesperantistoj, kiuj instruas Esperanton en Altlernejo. Li sciigis nin, ke ĉirkaŭ 60 gestudentoj elektis Esperanton, kiel studmaterialon anstataŭ la angla, franca, itala kaj aliaj lingvoj instruataj en la Universitato.

La gestudentoj trovis Esperanton multe pli facila ol la aliaj lingvoj. Estas imitinda ekzemplo kaj al s-ro Passini ni deziras sukceson kaj gratulas.

**GAZETOJ RICEVITAJ**

Ni ricevis la jenajn kaj dankas: "AGIG", Rio Grande, Jornal da Cidade, The Courier-Mail, el Aŭstralio, A Caminho da Luz, Correio Fraterno do ABC, O Líder, A Voz da Cidade, Sei, Integração, Diário de Taubaté, Gazeta da Bahia, Folha de Caçapava, O Tambaú, ZET, el Jugoslavio, O Monitor, Boletim Cerqueira, Suda Stelo Impacto, A Tarde, Tagiĝo, BEJO-Bulteno, Brazila Katoliko, Reformador, Lingvologia revuo el Aŭstralio, kaj aliaj.

De la nordo ĝis la sudo niaj gesamideanoj laboris kun granda entuziasmo kaj sukceso por la unua UK en la suda hemisfero. Ni asertas, ke la esperantistoj ne nur movigis sed ankaŭ skuis forte la landon pere de radio, gazetoj kaj aliaj informmanieroj. La rezultato estis pozitiva, pli ol mil geesperantistoj aliĝis kaj multaj, kiuj ne aliĝis, partoprenis la gravan eventon.

**SPIRITA ELDONA SOCIETO**

La Spirita Eldona Societo F. V. Lorenz havis sian giĉeton en la kongresejo. Krom vendi librojn kaj klarigi la celon kaj agmanieron, ĝia direktoro, Delio Pereira de Souza kaj siaj helpantoj multe propagandis pri la eldonitaj verkaĵoj. Estas aĉeteblaj bonaj verkoj de la naciaj kaj internaciaj aŭtoroj. La korespond-adreso de la societo: Caixa Postal Nº 3.133 - CEP 20.000 - Rio de Janeiro (RJ). Kontaktu la societon kaj aĉetu bonajn spiritismajn librojn!

**ILHÉUS (BA)**

La Ilheus Esperanto-Grupo, deklarita de Publika Utileco, gajnis buston de Zamenhof, donacitan de Banco do Estado da Bahia. Danke al la persista laboro de nia vicprezidanto Eleus Leonardo de Sá en tiu fama urbo, oni sukcesis starigi monumenton al la kreinto de Esperanto en Ilheus.

Sam-no Eleus senĉese organizas kursojn kaj instruas la internacian lingvon, ne nur en sia urbo, sed ankaŭ en la ĉirkaŭaĵo.

**BAURU (SP)**

La prezidanto de la Baŭrua Esperanto-Societo krom instrui la lingvon en la lernejoj kaj Universitato de Bauru kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, kontaktas plurajn politikistojn, kies atenton oni bezonas por rekoni la valoron de Esperanto oficiale.

La prezidanto de la Societo, Prof-ro Euclydes Geraldis de Carvalho, dissendis cirkulerojn al senatanoj, deputitoj kaj asembleoj pri Esperanto. La reago estas tre favora. Post la granda kaj sukcesa UK certe la opinio de multaj personoj favoras al nia movado. "Ni semu kaj semu!" . . .

**JUNDIÁI (SP)**

En ĉiu tiu urbo la komunuma Konsilantaro por kulturo disdonis atestilojn al la lernantoj, kiuj finis la Esperanto-kurson en la monato julio 1981-a.

Ni dankas la ĝentilan inviton kaj deziras prosperon al la novbakitaj esperantistoj de tiu konata urbo.

**GUARULHOS (SP)**

Estis fondita en tiu ĉi urbo la "Associação Guarulhense de Esperanto" meze de monato julio 1981-a.

Samtempe estis disdonitaj atestiloj pri la ĵus finita Esperanto-Kurso, kiun organizis kaj gvidis D-ro Lacorday Andrade, kiu multe laboras por nia movado en Guarulhos, kunlaborante kun EASP. Ni deziras al ĉiuj sukceson.

**SAN-PAŬLO (SP)**

Rekomenciĝis kursoj de Esperanto en la Asocio post la UK. La 22-an de aŭgusto estis farita interesa prelego pere de diapozitivoj, de s-ro Tibor Szekelj, el Jugoslavio. Nuntempe multaj eksterlandanoj vizitadas la ejon, ĉar pluraj faras rondvojaĝojn tra Brazilo.

San-Paŭlo estas la kongres-urbo de BKE.

**CURITIBA (PR)**

Ni estis informitaj, ke en Curitiba estis organizita junulara grupo. Ili emas reaktiviĝi kaj labori por la movado en tiu urbo kaj en la ŝtato mem. La junularo akceptas helpon; ĉiu povas aliĝi al la grupo, eblas patroni la junularan organizaĵon. Ĉiu helpo kaj kunlaborado estas bonvenaj.

Antaŭ la 66-a UK la gejunuloj Espedita Feitosa, Paulo Sator kaj Itacir Luchtemberg gvidis tri kursojn kaj instruis Esperanton al ĉirkau 60 gelernantoj. Estas planita junulara renkontiĝo en tiu urbo en januaro 1982-a. Temas pri imitinda klopodo.

**LAGEADO (RS)**

Sam-no Lenio Marobin iĝis radiamatoro kun la prefikso PY3YuX-QRA-Lenio Marobin. Li estas tre utila al nia movado, same kiel estas la aliaj radiamatoroj.

**S. SEBASTIÃO DO CAÍ (RS)**

Sam-no Oto Vaske, same radiamatoro, informas nin, ke en la urbo Tres Passos (RS) ekzistas strato Esperanto, ne nur en Caí, kie li loĝas. La straton nomumis la urbestro je peto de iu samideano, kiu iam loĝis tie. Ni dankas la informon al nia vicprezidanto Vaske.

**HUNGARIO**

Inter la 27-a de decembro 1981 kaj la 2-a de januaro de 1982 en Budapesto okazos Internacia Ekonomikista Simpozio, organizita de la Scienca kaj Faka Komisiono de Hungara Esperanto-Asocio, kunlabore kun la Hungara Ekonomika Societo la budapeŝtaj Ekonomika Universitato "Karl Marx" kaj altlernejo pri Financo kaj Administrado la Budapeŝta Scienca Centro de UEA kaj TEJO-Komisiono pri la Scienca Apliko de Esperanto.

La laborlingvo estos Esperanto: La temoj de la Simpozio estos: a) La socia rolo de la ekonomikaj sciencoj; b) La situacio de la supera instruado de ekonomio; c) Tutmondaj problemoj kaj nacia planado; ĉ) Estigo de Nova Internacia Ekonomia Ordo; d) La lingvaj problemoj el ekonomia vidpunkto; e) Terminologiaj problemoj de la ekonomiko; f) Utiligo de komputiloj en la ekonomiko; g) Sociaj eksperimentoj; kaj ĝ) Aliaj ekonomikaj

problemoj.

Esperanto-Redakcio de ORF, ni ricevis la jenan mesaĝon: "Kun elkoraj salutoj prezentataj de la Esperanto-Radakcio de Radio Wien, Aŭstrio: Se vi jam ricevis la 50-paĝan broŝuron "Superrigardo pri Aŭstrio" de ni mem eldonitan, jen elkora invito ke vi skribu al ni petante senpagan alsendon. La ĉefa celo de la broŝuro estas la plibonigo de nia prikoresponda statistiko, ni povas sendi nur unu ekzempleron al ĉiu unuopa peto.

## DEZIRAS KORESPONDADI

S-ro Fridrich Zold deziras korespondi kun brazilanoj. Kolektas esperantaĵojn. Kiu deziras kontakti s-anon "Zold, volu skribi je la adreso: S-ro Fridrich Zold - CS 07632, BORŜA-ĉ. 368 - Ĉekoslovakio.

## MONO RICEVITA POR LA BULTENO

Ni ricevis de la jenaj geamikoj kaj dankas:

| | Cr$ |
|---|---|
| Antonieta Almada Miranda | 1.000,00 |
| Maria Monteiro | 200,00 |
| José Passini | 2.000,00 |
| D-ro Helio F.Aderne | 500,00 |
| Libroj venditaj (F.S.A.) | 500,00 |
| Alberto de los Santos | 250,00 |
| Cicero B. Pimentel | 200,00 |
| Nydia Krieger | 2.500,00 |
| Carlos H.Dionisio | 500,00 |
| D-ro Alberto Flores | 500,00 |
| Nestor Lellis | 500,00 |
| D-ro Ivo Sanguinetti | 500,00 |
| Antonio L.B. Pereira | 500,00 |
| D-ro Wilson Deslandes | 1.000,00 |
| Sirio Silva | 500,00 |
| Marcelo V. Andrade | 1.000,00 |
| Expedita Feitosa | 1.000,00 |
| Claudio Zimmermann | 300,00 |
| Sara Fisher | 60,00 |
| Serafina Wranka | 1.000,00 |

## PORTO ALEGRE (RS)

Nia vicprezidanto Ernani Dias Corrês sendis al ni Cirkuleron pri "A Necessidade de Uma Língua Internacional", de Augusto Comte, temo prezentita kaj debatita en la ""III-a Reunião de Positivistas", kiu decidis pri la forlaso de la ideo adopti la italan lingvon, kiel internacian. Ni dankas al nia kara s-ano la komunikon kaj gratulas pri la decido okazinta.

## II-A KONGRESO DE BKE

BKE okazigos sian II-an Kongreson en San-Paŭlo (SP) de la 31-a de oktobro ĝis la 2-a de novembro de 1981-a.

Estos tiam la balotado kaj aprobo de la statuto de la organizaĵo, dum la renkontiĝo. En ĉi tiu renkontiĝo estas konsilinde partopreni pro la gravaj okazaĵoj atendotaj, kaj ĉar komenciĝas nova erao en la brazila Esperanto-movado post la 66-a UK.

La publiko elmontris grandan intereson por la internacia lingvo kaj nun estas grava la laboro de la esperantistoj, ne lasante ke la entuziasmo malaperu, sed organizi kursojn kaj rekruti novajn batalantojn por nia movado.

La kongreskotizo, ĝis la 15-a de septembro de 1981-a estas Cr$ 300,00 - kaj poste, Cr$ 500,00, ĝis la 31-a de oktobro. Kiu estos malhelpata ĝin partopreni, volu tamen aliĝi, ĉar tiel oni helpos al ni daŭrigi la laboron por nia bela idealo: vidi Esperanton ĉiam pli kaj pli proksime de la venko. Ni dankas ĉies komprenemon kaj amikan apogon. Ĝis la kongreso!

La aliĝkotizon volu sendi al la kasistino Maria Pozder Almada, Rua Galeão Carvalhal, 31/73 - Santos (SP) - CEP 11100 - Anticipe, dankon!

Ĝis la 25-a de aŭgusto aliĝis la jenajn gesamideanoj Euclydes Geraldis de Carvalho, Luiz Reis, Mario Ritter Nunes, Cicero B. Pimentel, Jair Ricci Peixoto Laguna, Nydia Krieger, Eduardo J. M. Pinheiro, Ary Zamora, José Saraiva Matos, Ivo Sanguinetti, Izaura Sanguinetti, Izaura Rosa Simões, Maria Almada, F.S. Almada, Elvira Fontes, Walter Francini, Rosa Francini, Amelia Maiumi Hamada, Deodato França Ribeiro, Eurico Antonio Ribeiro, José Luiz Ferreira, Marcelo Urbano Ferreira, Francisca Martos, Oswaldo Leite de Moraes, Néia Lucia Souza, Ramiro Barros de Castro, Herasmo Leite Soares, Neima Cardoso Adôrno, Francisco Rodrigues de Moraes Sobrinho.

Estas konfirmitaj la prelegoj farotaj de ges-roj Euclydes G. de Carvalho kaj Maria Almada, vicprezidantoj de BKE, dum de la II-a kongreso okazonta en San-Paŭlo.

## DISVASTIGU ESPERANTON PRAKTIKE KAJ "SENDOLORE"

Pri tiu ĉi temo prelegis, dum la 66-a UK, s-ano Luciano Paff, el Argentino. Interalie li citis la jenajn frazojn de L.L. Zamenhof: "Ĉio, ke rezultigos unu solan plian uzanton de la lingvo estas pozitiva kaj tiel subteninda". "Ĉio, kio neniun ofendante, povas krei pacan ponton inter la popoloj, tio sole ne devas esti evitata timeme en niaj kongresoj, sed kontraŭe ĝi devas esti la esenco de niaj kongresoj".

S-ro Paff interalie diris: "Ni ĉiuj bezonas pli bonan mondon. Ni ĉiuj povas konsenti, ke la monda neŭtrala lingvo helpas . . . grandege"! Li konsilas la enkondukon de Esperanto en turismon kaj la eldonadon de serio de TURISTA-UNIVERSALA-KOMUNIKILO, kiu entenus la jenajn naciajn lingvojn: Anglan, francan, germanan kaj Esperanton. Kiu deziras kunlabori volu skribi al s-ro Luciano Paff, Monteverde 3955, 1636 OLIVOS, Buenos Aires - Argentino.

---

**BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO**
A L I Ĝ I L O
II-A BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO
De la 31/X-2-a/XI
1 9 8 1

Mi aliĝas al la II-A Brazila Kongreso de Esperanto, sendante la pagon per ............................ ............................ (ĉeko, poŝt-mandato aŭ pagordo).

Kotizo ................ Cr$ 300,00
ĝis la 15/IX/81
Poste .................. Cr$ 500,00

Junuloj ĝis 20 jaraĝa pagas 50%

Nomo . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Adreso . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Urbo . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . Dato . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

**MALLONGE**

La eminentaj esperantistoj, prof-roj D-ro Alberto Flores kaj D-ro Benedicto Silva, aperigis grandajn artikolojn pri nia movado kaj pri gravaj batalantoj ĝiaj en nia lando, en la spiritisma periodaĵo "Caminho da Luz".

Bonega kunlaborado de niaj vicprezidantoj por la 66-a UK.

La Trupo de Oomoto, kiu post la 66-a UK faras rondvojaĝojn tra Brazilo, prezentiĝos en Santos ankaŭ. Ilin akceptos la "Associação Japonesa de Santos" (Associação Religiosa Oomoto do Brasil), la 8-an de septembro 1981.

La "Associação Religiosa Oomoto do Brasil" kontaktiĝis kun la prezidanto de Brazila Konsilantaro de Esperanto, S-ro F. S. Almada, kiu kunvokis la geesperantistojn por partopreni la prezentaĵon de la Trupo: "Noite de Arte tradicional Japonesa".

La II-a Tutamerika kongreso de Esperanto okazos en Bogoto-Kolombio, de la 17-a ĝis la 20-a de julio, 1982.

En la urbo Niteroi (RJ) la gazeto "O Fluminense" aperigas artikolojn pri Esperanto kaj pri la tieaj kursoj. Ĝia kunlaboranto estas D-ro Joaquim do Couto. La kursojn gvidas prof-ino Balbina Ferreira.

Centro de Cópias Cerqueira - compôs e imprimiu